Vielmehr muss die menschliche Fähigkeit der Interpolationsaufnahme bei der optischen Wahrnehmungen ermittelt werden. 1951 unterzogen Hake und Garner das absolute Urteil zum ersten Mal informationtheoretischen Messungen (Frank, 1969, Seite 111). Die Versuchsteilnehmer mussten Ausschnitte auf einer Geraden, die durch einen Zeiger markiert waren, schätzen. Die Versuche zeigten, dass neun Reizstufen sicher unterschieden werden können. Hake und Garner berechnen für das Bestimmen eines Geradenausschnittes eine empirische Information von 3,17 bit/Urteil. Eine nur geringe Abweichung von diesem Wert zeigte sich in einem ähnlichen Experiment von McGill. Er errechnete eine Information von 2,97 bit/Urteil. Im Folgenden wird von einem gerundeten Wert von 3 bit/Reiz ausgegangen.

Dieser Wert ermöglicht die Berechnung der Information von Punkt- und Säulendiagrammen. Nicht bzw. nicht sicher zu bestimmen ist die Information von Kreis- und Liniendiagrammen. Um diese berechnen zu können, muss der Informationsgehalt eines Winkels bestimmt werden.


In der Literatur werden verschiedene Untersuchungen zur Bestimmung der menschlichen Fähigkeit des Winkelschätzens vorgestellt. Gegenstand dieser Untersuchungen war die Auswirkung der Ausrichtung eines Winkels auf die menschliche Wahrnehmungsfähigkeit. Wundt, Helmholtz, Tichener, Ladd, Piaget sind nur einige der Vertreter, die die im 19. Jahrhunderte vorherrschende Meinung, spitze Winkel werden überschätzt und stumpfe unterschätzt, durch ihre Versuche konsolidierten. Zu diesen Ergebnissen im Widerspruch stehen die Resultate der Untersuchungen von z.B. Jastrow und Fisher. Ausführliche Darstellungen dieser Arbeiten geben Fischer (1969),McLean & Stacey (1971) und Berry (1968).

Die voneinander abweichenden, zum Teil widersprüchlichen Ergebnisse der unterschiedlichen Experimente basieren nach Fisher (1969) auf der zum Teil nicht eindeutigen Dokumentation durch die Autoren. Unabhängig davon betonen sie, dass viele Faktoren auf die Fähigkeit des Menschen, Winkel zu schätzen, einwirken und individuelle Abweichungen aufweisen. McLean und Stacey (1971) kommen nach der Analyse der Ergebnisse früherer Arbeiten zu dem Resümee, dass drei Faktoren auf die Winkelschätzungen einwirken: die Winkelgröße, die Orientierung des Winkels und die Art der geforderten Antwort (reproduktiv oder wiedererkennend).

Eine informationstheoretische Analyse der Ergebnisse ist bislang nicht durchgeführt worden. Dies ist das Ziel der im Folgenden beschriebenen empirischen Untersuchung, die als Fallstudie betrachtet werden muss. Es war zu erwarten, dass die Fähigkeit des Menschen, Winkel sicher zu schätzen, auf maximal acht bis neun unterschiedliche Abstufungen beschränkt ist. Diese Hypothese beruht auf der durch Frank (1969, Seite 113) getroffenen Aussage, dass eine psychologische Grenze der Wahrnehmung eines Reizes bei 3 bit/Urteil anzunehmen ist.

Für das weitere Vorgehen ist die Theorie des zweistufigen Prozesses bei Winkelschätzungen von Berrys (1968), die bei einer Befragung von Teilnehmern eines Vortests zu dem vorliegenden Versuch bestätigt worden ist, grundlegend: „Specifically, it is proposed that S tends to use an imagined vertical or horizontal axis as a reference point for estimating the separation of the sides of an angle. His choice of reference axis, it is hypothesized, will depend upon which imaginary axis is closer to the oblique sides of the angle in question.“

Bild 1: Bestimmung der Winkel der Versuchsbedingung mit vier Winkeln.



Somit kann die oben aufgestellte Hypothese auf spitze Winkel eingeschränkt werden. Um eine Verifizierung der Aussage vornehmen zu können, sind die Teilnehmer unterschiedlichen Gruppen mit vier, acht, sechzehn beziehungsweise zweiunddreißig zu schätzenden Winkeln zugeordnet worden. Zur Bestimmung der Winkel ist der 90° Winkel in Sektoren, die in der Anzahl den Winkeln einer Winkelgruppe entsprachen, gegliedert worden. Der gerundete Mittelwert jeden Feldes bestimmte die zu schätzenden Winkel. In Bild 1 ist die Bestimmung der Winkel für die Versuchsanordnung mit vier zu schätzenden Winkeln exemplarisch dargestellt worden.

Auf dieselbe Weise sind für die vier Versuchsanordnungen folgende Winkelgrößen berechnet worden

Tabelle 1: Die durch die Versuchsteilnehmer zu schätzenden Winkelgrößen der vier Versuchsbedingungen.

Versuchsbedingungen; Anzahl der zu schätzenden Abstufungen	die zu schätzenden *n* Winkelgrößen (Angaben in Grad)
4	11, 34, 56, 79
8	6, 17, 28, 39, 51, 62, 73, 84
16	3, 8, 14, 20, 25, 31, 37, 42, 48, 53, 59, 65, 70, 76, 82, 87
32	1, 4, 7, 10, 13, 15, 18, 21, 24, 27, 30, 32, 35, 38, 41, 44, 46, 49, 52, 55, 58, 61, 63, 66, 69, 72, 75, 77, 80, 83,86, 89

Dem Versuch ist eine Übungsphase, in der den Teilnehmern die später zu schätzenden Winkel zweimal in ansteigender und abfallender Reihenfolge präsentiert worden sind, vorausgegangen. In der anschließenden Testphase betrachteten die Teilnehmer die in zufälliger Reihenfolge dargebotenen Winkel für je drei Sekunden. In einer Tabelle mussten sie den geschätzten Wert ankreuzen.

An der Untersuchung nahmen insgesamt achtzig Versuchsteilnehmer, also zwanzig Probanden pro Versuchsbedingung, teil. Vierundvierzig der Personen waren weiblich und sechsunddreißig männlich. Sie waren Studierende der Erziehungswissenschaft der Universität Paderborn und im Alter zwischen neunzehn und zweiunddreißig Jahren.

Eine Analyse der Ergebnisse zeigt, dass 68,9 Prozent aller Schätzabweichungen kleiner als 10° sind. Unabhängig von der Anzahl der zu bestimmenden Winkel besteht eine maximale Abweichung der Schätzungen zum dargestellten Winkelwert von 22° beziehungsweise 23°. Die wenigen auffällig abweichenden Schätzungen (es betraf 6 der insgesamt 1.136 Schätzungen), die über diesen Wert hinaus falsch geschätzt wurden, sind statistische „Ausreißer", die nicht in die folgenden Berechnungen einbezogen werden. Zudem konnten die Schätzergebnisse von zwei Personen aufgrund fehlender Angaben nicht ausgewertet werden; beide sind der Gruppe mit 32 Winkeln zuzuordnen.

Die folgende Tabelle gibt einen Überblick über die Ergebnisse der vier Versuchsanordnungen. Die Fähigkeit eines Menschen, Winkelmaße richtig zu benennen, umfasst nach den Ergebnissen 7 bis 8 Winkel.

Tabelle 2: Absolute und prozentuale Angabe der Anzahl richtiger und falscher Ergebnisse der vier Versuchsanordnungen

	Versuchsanordnung: Anzahl zu schätzender Winkel			
Schätzung	4	8	16	32
Richtig	73 = 92,5 %	114 = 71,25 %	143 = 44,69 %	134 = 23,26 %
Zu groß	3 = 3,75 %	16 = 10 %	76 = 23,75 %	253 = 43,92 %
Zu klein	3 = 3,75 %	30 = 18,75 %	101 = 31,56 %	189 = 32,81 %
gesamt falsch	6 = 7,5 %	46 = 28,75 %	178 = 55,63 %	442 = 76,74 %
durchsch. korrekt genannte Winkel	3,7	5,7	7,1	7,5

Die diesem Experiment zugrundeliegende Hypothese ist durch die vorliegenden Ergebnisse, insbesondere die durchschnittlichen 7,1 beziehungsweise 7,5 korrekten Winkelnennungen bei sechzehn beziehungsweise zweiunddreißig Winkeln, bestätigt worden. Die maximale Grenze von acht bis neun unterscheidbaren Reizstufen ist nicht überschritten worden. Aufgrund der geringen prozentualen Zunahme falscher Antworten (um etwa ein Prozent von der Versuchsanordnung mit sechzehn zu der mit

zweiunddreißig Winkeln) wird davon ausgegangen, dass eine weitere Steigerung der Winkelanzahl keine nennenswerte Änderung dieses Ergebnisses bewirken würde.

Weiterführend sind aus den Ergebnissen folgende Werte der Transinformation von Winkeln berechnet worden:

Tabelle 3: Ergebnisse der Berechnungen der empirisch belegten Transinformation für die Versuchsanordnungen mit acht, sechzehn und zweiunddreißig Winkeln.

	H(S)	H(R)	H(SR)	T(SR)
4 Winkel	1,99 bit	2 bit	1,99 bit	2 bit
8 Winkel	3 bit	2,99 bit	4,01 bit	1,98 bit
16 Winkel	4 bit	3,97 bit	5,68 bit	2,29 bit
32 Winkel	5 bit	4,94 bit	7,55 bit	2,39 bit

Die errechneten Ergebnisse der Transinformation (ausschlaggebend sei an dieser Stelle das der Versuchsanordnung mit zweiunddreißig Winkeln) zeigen, dass Winkel eine Transinformation von 2,4 bit/ Urteil tragen. Dies bedeutet, dass der Mensch bei der Schätzung von Winkeln 5,3 Reizstufen sicher unterscheiden kann.

Werden diese errechneten Werte mit den Zahlen der durchschnittlich korrekten Schätzungen verglichen, zeigt sich eine deutliche Diskrepanz. Bei den Versuchsanordnungen mit sechzehn beziehungsweise zweiunddreißig Winkeln gaben 67 Prozent der Teilnehmer sechs und mehr korrekte Schätzungen ab. Folglich weisen die Daten einen Stichprobenfehler auf.

Zur Korrektur dieses Fehlers wird die von Miller und Madow (1954) aufgestellte Formel angewandt:

$$H' = H - \frac{Fg}{1{,}3863N}$$

Fg = Freiheitsgrade
N = Grundgesamtheit der Schätzungen
H' = Erwartungswert des H-Wertes, der aus der empirisch beobachteten Häufigkeitsverteilung berechnet wird
H = theoretisch aus der (zugrundeliegenden, nicht beobachtbaren) Wahrscheinlichkeitsverteilung zu berechnende Unsicherheit

Für die Versuchsanordnung mit 32 Winkeln errechnet sich ein theoretischer Transinformationswert von 3,01 bit. Folgende Abbildung, in der die errechneten Transinformaitonswerte für die vier Versuchsanordnungen sowie die aus einem hier nicht beschriebenen Vortest dargestellt sind, zeigt einen Sättigungswert der Transinformation von 3 bit/Urteil.





Bild 2: Mittlere Transinformation in Abhängigkeit der Reizinformation; abgebildet ist auch das Ergebnis aus dem Vortest mit sieben Winkeln (ld 7).



Die anfangs aufgestellte Hypothese, dass das ‚Absolute Urteil' von 3 bit auch auf das Wahrnehmen von Winkelschätzungen zutrifft, ist durch den Versuch bestätigt worden. Die Versuchsteilnehmer können in der Reizdimension Winkel acht Stufen sicher unterscheiden.

Die Bestimmung der Information eines Winkels ermöglicht die Beantwortung offener Fragen in der Berechnung der Information und dem Vergleich graphischer Darstellungsformen. Aufgrund des Ergebnisses, das ein Winkel eine Information von 3 bit transportiert, ist davon auszugehen, dass Graphiken mit der gleichen Darstellungsfunktion äquivalente Informationswerte zueinander aufweisen.

Zurückgehend zu der Ausgangsfrage der Untersuchung, wie kann das wachsende Wissensreservoire der modernen Gesellschaft zugänglich gemacht werden, muss weiterführend ein Informationsvergleich zwischen Text und Graphik gezogen werden. Umfangreiche Untersuchungen sind erforderlich.

Schrifttum

Berry, Keith E.: Estimation of angles. In: Perceptual and Motor Skills. Southern Universities Press. Band 26, S. 11-14. 1968.

Jacobs, Bernhard: Zeitschrift für Pädagogische Psychologie. German Journal of Educational Psychology, 8 (2), 1994, Seite 73 – 87. Graphische versus tabellarische Präsentation von statistischen Date.

Hake, H. W., Garner, W. R.: The effect of presenting various number of discret steps on scale reading accuracy. In: Journal of experiment Psychology. 1951. Band 42. S. 358-366.

Fisher, Gerhald H.: An experimental study of angular subtension. In: Quarterly Journal of Experimental Psychology, Band 21, S.356-366. 1969

Frank, Helmar: Kybernetische Grundlagen der Pädagogik. 2. Aufl. Band 2. Baden-Baden: Agis-Verlag. 1969.

McLean, Iain E.; Stacey, Barrie G.: Judgment of angle size: An experimental appraisal. Abgedruckt in: Perception & Psychophysics, Psychonomic Journals. Inc., Austin, Texas. Vol. 9 (6), S. 499-504. 1971.

Eingegangen 2008-02-25

Anschrift der Verfasserin: Sonja Eilks, Rotheweg 108, 33102 Paderborn

Determination of the Information of an Angle for Checking the Effectivity of Graphical Data (Summary)

In modern society, an effective knowledge transfer of numerical data is increasingly gaining in importance. Using the term information, human cybernetics and cybernetic education are trying to achieve comparability of transferred knowledge. The human capability of perceiving interpolations of linear distances and angular dimensions that is required in the perception of graphical representations cannot be determined by the classical information theory according to Shannon (1948) but has to be realised in an absolute judgment. In 1951, Hake and Garner computed an empirical information of 3.17 bit/judgment for segments of straight lines (Frank, 1969, p. 111).

In a case study the graphical element of angles was analysed. For this purpose, the 80 participants, assigned to different groups, had to estimate four, eight, sixteen, resp. thirty-two angles. From the results, a theoretical trans-informational value of 3 bit was computed. On this basis it can be assumed that graphics with the same representation function have equivalent informational values.

grkg / Humankybernetik
Band 49 Heft 2 (2008)
Akademia Libroservo / IfK

Cosmoglotta kaj Interlingue

de Věra BARANDOVSKÁ-FRANK, Paderborn (DE)

La revuo

La revuo Cosmoglotta, oficiala organo de la movado pri planlingvo Occidental[1], estis dum longaj jaroj redaktata en Svislando, danke precipe al du sindonemaj redaktoroj: Ric Berger kaj Alphonse Matejka (kp. Künzli 2006). La svisa periodo, komencinta jam 1933, estis unue fruktodona (kp. Barandovská-Frank 2007b). Sed Occidental, kiu antaŭ la dua mondmilito ĵus sukcesis stabiliĝi, portempe ne esprimante malsimpation al sia konkuranto Esperanto, baldaŭ devis fronti al nova konkurenco, Interlingua de IALA[2]. Estas malfacile prijuĝi, kiom taŭgis la decido ŝanĝi nomon de la lingvo de Occidental al Interlingu***e***. La "merkatmarko" Interlingu***a*** jam estis uzita por planlingvo Latino sine flexione, kiu tamen ne travivis la duan mondmiliton. Kaj okcidentalistoj, kaj Interlingua-IALA-anoj estas bone informitaj pri tio, la duaj eĉ vidas en Latino sine flexione sian antaŭulon kaj konscie transprenis la markon.

La jubilea numero 150 de Cosmoglotta en decembro 1949 ankoraŭ portis la titolon "Central organe de Interlingue (Occ)", en 1950 malaperis ajna indiko rememoriganta la epokon de Occidental (1922-1949), anstataŭe venis la titolo "Oficial mensual organe del Interlingue–Union". La centra oficejo de la Unio kaj la redakcio tiam estis en Cheseaux, Svislando, la abonantoj en Britio, Aŭstrio, Aŭstralio, Belgio, Kubo, Danlando, Finnlando, Francio, Italio, Nederlando, Norvegio, Rumanio, Svedio, Svisio, Ĉeĥoslovakio kaj Usono. En oktobro 1950 subite demisiis la longjara redaktoro Ric Berger[3], redaktinta numerojn 91-128 en la jaroj 1934-1939 kaj 129-156 en la jaroj 1946-1950. Alphonse Matejka, kiu jam delonge kune kun Fred Lagnel eldonis la ofsetan "serion B" de Cosmoglotta, helpadis al la redakcia komitato, ĝis kiam li en 1958 iĝis ĉefredaktoro. Intertempe pri la enhavo de Cosmoglotta zorgis internacia redaktoraro, konsistanta el Wilhelm Blaschke (Aŭstrio), Ilmari Federn (Britio), H. P. Frodelund (Danlando), L. M. de Guesnet, G. Aquiré kaj J. Roux (Francio), Kurt Feder kaj C.A. Pfeiffer (Germanio), Fr. Mascanzoni (Italio), A. Koning kaj M. den Outer (Nederlando), Dr. Haas, Kurt Hamburger, Fred Lagnel, A. Matejka kaj Dr. Pollog (Svislando), Ladislav Podmele kaj Jaroslav Podobský (Ĉeĥoslovakio).

Dum la paĝoj de Cosmoglotta antaŭ la milito plej ofte estis plenigitaj per temaro konkrete tuŝanta la lingvon Occidental (gramatikaj ŝanĝoj kaj komparo, lingvoevoluigo, terminologio) ties movadon kaj rilatan politikon, post 1950 la karaktero de la revuo tute ŝanĝiĝis. Ĝi pleniĝis per amuza kaj instrua legaĝoj, kiuj konsistigas ĉ. tri kvaronojn de unuopaj kajeroj. Jen interesaĵoj, ofte transprenataj de etnolingvaj revuoj: pri lingvoj (pri usona kaj brita ortografioj, pri devanagari, pri piĝinoj, pri la okcitana lingvo...) politikaj

[1] Lanĉita 1922 de Edgar de Wahl
[2] International Auxiliary Language Association
[3] Duonjaron poste publikiĝis Interlingua de IALA, Berger transiris al ĝi, iĝis redaktoro de „Currero International" kaj sekretario de UMI

okazaĵoj, kuriozaĵoj pri artoj, historio, biologio k.s., popularsciencaj tekstoj, ŝercoj kaj ŝercbildoj, karikaturaĵoj, krucenigmoj, originalaj tekstoj – rakontoj, legendoj, poemoj, tradukoj. La enhavo fariĝis bunta, evidente por allogi la legantaron, kiun jam enuigis daŭraj kvereloj pri gramatikaj subtilaĵoj kaj klaĉoj pri esperantistaj herezuloj. La redakcio eĉ petis pri "diverseco": "Ju pli diversaj estos la temoj de artikoloj en Cosmoglotta, des pli interesa estos nia revuo" (1951/160:22). La redakcio demandis pri la deziroj de la legantoj (ekz. 1956/194:77). Oni petis dediĉi kelkajn kajerojn al interesaj temoj (ekz. al "mimika esprimo de sentoj" apartenis tuta 1950/155). Pluraj kajeroj, redaktitaj de Ric Berger, alportis longajn artikolojn pri lia fako, pentroarto.

Ekde 1954, por la numeroj 179-229, ĝis sia morto en 1962, la redaktadon kaj administradon parte trasprenis Kurt Hamburger. La revuo ricevis bonkvalitan paperon kaj preson, eldonejo estis en St. Gallen. En la jaro 1960, kiam oni enkondukis la rubrikon "libera sekcio", iĝis prilingvaj artikoloj denove pli oftaj, ekz. en 1962/227 plenigis la artikoloj de A. Matejka pri facileco kaj reguleco en helplingvoj kaj tiu de W. Wellekens pri kosmoglotismo kiel socia sistemo 10 el 16 paĝoj.

Numero 1971/265, la lasta en la jubilea, kvindeka jaro de Cosmoglotta, estis la lasta el presitaj dum 18 jaroj sur bonkvalita papero en presejo Künzler en St. Gallen. La presejo devis plialtigi la prezojn, tial la redaktoro Alphonse Matejka (helpata de Fred Lagnel kaj Adrian Pilgrim) revenis al ofseta presado, uzita jam inter 1948 kaj 1953. En 1972 tiel bonorde aperis ĉiuj kvar numeroj (266-269). La numeron 269 enkondukis artikolo, invitanta al fruktodona polemiko pri internaciaj lingvoj kaj ties libera konkurenco (laŭ citaĵo de Ivo Lapenna): ĉiu ja rajtas elprovi plurajn el ili kaj fari liberan individuan decidon. Alphonse Matejka, tiam sepdekjara, evidente spertis malvigliĝon de Interlingue-movado, montris sin tamen optimisma...

Post paŭzo en 1973, Cosmoglotta iĝis portempe (kajeroj 270-274) suplemento de la interlingvistika revuo *Union*, eldonata de J.W. Visser en Amsterodamo, kio tamen ne trovis pozitivan eĥon ĉe la legantoj, en 1975 ĝi do revenis al Svislando, la kajero 1975/277 estis eĉ denove bele presita en St. Gallen. La revuo tamen troviĝis en financa krizo kaj jam en 1975/275:5 oni singarde anoncis, ke ĝi aperos neregule. Post trijara paŭzo denove kompletis jarkolektoj 1979 kaj 1980 (kajeroj 278-285); el la ripetitaj petoj trovi novajn abonantojn oni povas konkludi, ke la intereso velkis. La redaktora enkonduko de la kajero 1980/285 "La internacia lingvo – pli utopia ol iam" amare konstatas, ke la publiko ne plu interesiĝas pri internaciaj lingvoj: precipaj interesoj de la junularo estas usona muziko, sporto kaj televido, kiuj ĉiuj okazas en la angla lingvo. Por funkciigi la propagadon kaj movadon pri internaciaj lingvoj bezonatas mono, sed tiun nun neniu pretas disponigi. Sekve, internaciaj lingvoj inkluzive de literaturo kaj terminologio reprezentas kapitalon uzeblan de sciencistoj kaj ĉiuj, kiuj pretos ĝin iam uzi. Sur la paĝo 54 de la koncerna kajero estas listo de kvardeko da tajposkriptoj (lernolibroj, vortaroj, tradukoj, turismaj prospektoj k.s.), pretaj pro publikigo, kiuj kuŝas parte en la biblioteko en La Chaux-de-Fonds, parte en la Interlingue-Instituto en Cheseaux. (La unua listo kun 64 titoloj estis aperinta jam en 1964/237).

Ekde la sekva numero (1985/286), la redakcio oficiale transiris al Adrian J. Pilgrim en Britio. En la enkonduko, *Alphonse Matejka* klarigis, ke ĝia lingvaĵo estos "la varianto Sjöstedt" uzita en la plej ampleksa faka verko en Interlingue, kiun oni ja ne povas ignori.

Tiu ĉi sciigo kune kun optimisma konstato, ke ekde 1981 laboras nova direktora komitato de Interlingue-Union, estis la lasta Cosmoglotta-artikolo de la tiam 83-jara redaktoro, kiu en la jaro 1987 retiriĝis el ĉiuj siaj funkcioj, tamen ĝis sia morto en 1999 vizitadis la interlingvistikan bibliotekon en La Chaux-de-Fonds (kp. Künzli 2006:862 kaj miajn personajn rememorojn). Li postvivis sian iaman kolegon kaj postan rivalon *Ric Berger*, kiu mortis 89-jaraĝa en la jaro 1984, estinte funkciulo de "Union Mundial pro Interlingua", redaktinte ties organon "Currero" kaj poste sian revuon "Revista de Interlingua".

La sekva paŭzo daŭris 13 jarojn. Dum ĝi mortis pluaj motoroj de Cosmoglotta kaj de la movado: Ilmari Federn, Fred Lagnel, Jaroslav Tichý, Charles Sprague, Tomáš Ondráček. La redaktoro Adrian Pilgrim konstatis (1998/287:1-2), ke la interlinguanoj estas malmultaj, sed ankaŭ aliaj planlingvaj movadoj, inkluzive de la esperantista, perdas membrojn. Li kuraĝigis la samideanojn (coidealistes) al persista aktiveco. En la sekva numero (1999/288:1) li ĝojas, ke restabiliĝis la oficiala organo de "malgranda rondo de apogantoj". Samtempe (paĝoj 4-6) li pripensas reveni al la originala nomo "Occidental".

Ekde numero 1985/286 estas Cosmoglotta administrata de Erich Werner, sekretario de Interlingue Union, en St. Gallen; la redakcion faras, post Adrian Pilgrim, Ĉeĥo Bedřich Plavec, kies unuaj artikoloj aperis en 1998. La nuntempa "organ oficial del Interlingue-Union" aperas malregule[4] en okpaĝa amplekso. Nun, en la komputila erao, ĝi enhavas kolorajn fotojn kaj bildojn. Ĝi alportas novaĵojn pri lingvoj, lingvistiko kaj lingvopolitiko, kiel pri „Evolution del global lingue" en 2005/304:1k.5, pri neologismoj en la germana, pri instruado de la Angla en Japanio (2007/306:15), krome pri interesaj temoj ekz. el filatelio, geografio, zoologio, historio kaj turismo, kaj okupiĝas pri kelkaj problemoj de Interlingue mem (ekz. numeroj 2002/297, 2003/300 kaj 2004/303 estis po duone dediĉitaj al ortografio kaj fonetiko). Malregule aperadas rubrikoj „Forum" (Leteroj de la legantoj, administraj kaj organizaj aferoj) kaj „Libres" (Recenzoj). La lasta paĝo ("Ultima página") foje enhavas enigmojn kaj ŝercojn.

Interlingvistiko

Interlingvistikan rubrikon redaktis ekde 1951 Kurt Feder, longajra aktivulo, kiu i.a. adaptis germanan stenografion al Interlingue (1950/156:92-93). En la rubriko unue ripetiĝis argumentoj por *Interlingue:* ĝi estas posteŭlo de la latina, peranta ties kulturon kaj vortprovizon, ĝi estas senpere komprenata de parolantoj de ĉefaj eŭropaj lingvoj, ĝi estas naturalisma (do: natura) kompare al tro regulaj, skemismaj, artefaritaj, nenaturaj Esperanto kaj Ido (vd. ekz. 1951/159:4-7). Foje aperadis lingvaj rimarkoj pri Interlingue, ekz. demandoj kaj respondoj pri taŭga traduko aŭ korekta uzo de gramatikaĵoj, kiel finaĵoj de adverboj 1950/151:2 kaj 1950/157:98-99, eŭfoniaj finaĵoj 1950/153:37-38, verbaj derivaĵoj 1953/174:6-7, uzado de Interlingue en faka prozo (1955/186:39-42), uzo de verbaj tempoj (1957/197:20-21). En 1958/203:22-27, 1958/205:55-59 kaj 1959/209:20-24 prezentiĝis superrigarde kaj diskute la "Regul De Wahl", t.e. la baza regulo por vortoderivado, kun revizioj de W. Reeve. Post la apero de sondiskoj kun tekstoj en Interlingue oni denove diskutis pri ties eŭfonio kaj sonĥaraktero (1959/210:34-35). La gramatikon de

[4] Numero 306 de la 66-a jarkolekto aperis en 2007

Interlingue en Interlingue de F. Haas oni pridiskutis en 1960/217:57-58, kaj en 1961/225:87-88 krome oni starigis kelkaj novajn proponojn, ekz. pri formoj de personaj pronomoj en 1961/223:59). Multfoje aperis artikoloj de "Interlinguisticus" pri ĥaraktero, tradicio kaj modernigo de la lingvo, ties rilatoj al la Latina, al internacia vortprovizo kaj al laboroj de IALA. Unu el la reagojn vekis A. Tallbäck (1961/222:37-40). Natureco kaj artefariteco en la internaciaj lingvoj estis unu el la plej diskutataj temoj, ekz. en 1961/222:41-44 estis represigitaj teorioj de Otto Jespersen kaj Alphonse Matejka el 1943. Plurajn kontribuaĵojn faris F.R. Pope, aŭtoro de "English-Interlingue Dictionary", kiu proponis kelkajn ŝanĝojn/variantojn de finaĵoj (1961/223:54-57), atentigis al gramatikaj funkcioj de litero "t" (1967/248:42-43) k.s.

Eksperimento kun lerntempo-longeco bezonata por Interlingue estis farita kun 15 lernantoj de katolika gimnazio en Disentis (kantono Grizono), kiuj havis antaŭkonojn de la lingvoj franca, latina kaj greka. Interlingue estis instruata ekde oktobro 1956 ĝis februaro 1957 dum 30 instruhoroj. Post tri lecionoj, la lernantoj senprobleme komprenis tekstojn en Interlingue, kaj post la menciitaj 30 instruhoroj ili regis la lingvon kaj skribe, kaj parole (1957/197:28). La lernejo eldonadis revuon „Li Gimnasiast" (vd. 1958/203:29-30).

La redakcio de Cosmoglotta proponis alian eksperimenton (1958/204:52-54): kvankam la revuo aperas en la lingvaĵo, aprobita de la Akademio, la legantoj havos eblon uzi siajn variantojn kaj ŝanĝojn ene de la rubriko "*Libera sekcio*". En la sekva numero aperis en tiu rubriko artikolo de K. Wilgenhof pri lingvopolitiko de Unesko, skribita tamen en korekta lingvo kaj komentita de la redakcio (1958/207:83-85). Ankaŭ sekvantaj temoj koncentriĝis pli al la enhavo ol al la lingvaĵo, ekz. tradukoj el la Latina (1959/208:3-5). Sekvis propono restarigi la etimologian ortografion (1959/210:36-37) kaj dialogo inter konservemuloj kaj modernistoj (1959/211:49-54). Nur en 1960/215:28-30 aperis unuaj ŝanĝproponoj, kiuj tamen koncernis nur enkondukon de kelkaj neologismoj, kiel *flash, missile, parv, gratias, troppo, streik*. En 1960/219:86-92 , 1961/221:17-20, 1961/224:70-73 oni diskutis pri traduko de diverslingvaj idiotismoj kaj pri specifaj sufiksoj, en 1961/221:24-26 pri "falsaj amikoj". Poste, kiam evidente neniu plu emis fari revoluciajn ŝanĝojn, sekvis rubriko nomata simple "Lingvo", kie pritraktiĝis malgravaj detaloj kiel sinonimoj, diraĵoj kun verbo "iri" (1966/243:24-26) k.s.

Longa artikolo (1960/217:49-56) interesiĝis pri poezio en internacia lingvo kaj alportis tradukojn de kelkaj poeziaĵoj, i.a. de Puŝkin kaj de Wordsworth. Kelkfoje aperis tradukoj de poemoj el naciaj lingvoj, ekz. el la franca en 1968/252:51-52, el la germana en 1969/255:24 kaj 1969/257:52.

Pritraktiĝis *novaj projektoj*, ekz.: *Nove Auxilia* de Gerard Morin en 1950/153:34, *Universal Latein* de Karl Plötzl-Pecelius en 1950/153:50, *Veneto* de Villafranca di Verona kaj *Picto* de John Williams en 1950/154:51-52, "logika lingvo" *Loglan* de James Brown en 1961/220:14, 1961/221:21-24 kaj denove en 1967/249:53-57, „la elektronika lingvo de estonteco" *ALGOL* en 1961/223:63-64, *Neo* de Arturo Alfandari en 1961/225:91-95 kaj tiesrilate la demandaro el Neo-Bulten pri diversaj kvalitoj de Esperanto, Ido, Interlingua, Interlingue kaj de Neo, kiu venkis en la komparado (1964/236:40-42); *Unilingua* de Noubar Agopoff estis priskribita en 1965/240:44, *Suma* de B. Russel kaj *Anglo-Lat* de Robert Monteiro en 1966/245:60-61, *Aksiom variant* de

D. Bayer en 1970/260:36-39, *Unesal* de Erich Weferling en 1970/260:46 kaj *Intal* de la sama aŭtoro en 1970/261:61-62, *Intersystemal* de Pavel Mitrovič en 1970/261:61, projekto de Anson G. Szaszy el Wellington en 1980/285:52-53, *Glosa* de Ron Clark kaj Wendy Ashby en 1985/286:5-7. Enigme aspektas la anonco pri "Union", oficiala organo de "Union International de Interlinguistik Service", redaktata de W.J. Visser en Amsterodamo en *Eurolatin*, sintezo de Esperanto, Ido, Interligue kaj Interlingua. La revuo servis kiel informejo por ĉiuj movadoj (vd. 1971/265:61-62).

Inter *recenzoj* aperas tiuj de la plej gravaj interlingvistikaj verkoj, kiel "Interlingvistiko kaj esperantologio" de W.J.A. Manders en 1950/158:114-117 kaj 1951/159:2-3, "One language for the world – and how to achieve it" de Mario Pei en 1958/207:85-89, "Précis d`interlinguistique " de Monnerot-Dumaine en 1960/216:44-46, „Les langues internationales" de Pierre Burney en 1962/228:46-48, „Language Problem and World Unity" de Bhabes Chandra Chaudhuri en 1962/228:48, „Introduction to a Theory of language Planning" de Valter Tauli en 1969/256:45-48, „The Naturalistic School in Interlinguistics" de Tazio Carlevaro en 1975/276:16, "Le lingue inventate" de Alessandro Bausani en 1975/277:28-30, "Civilisation e lingue universal" de Stefano Bakonyi en 1979/281:63-64; menciiĝis ankaŭ aliaj lingvistikaj verkoj en naciaj lingvoj, ekz. „Fischer Lexikon" (1962/230:11-12). Originala ideo pri "lingvo-notoj" de "eminenta esperantista aŭtoro, ĉe kiu kurioze respeguliĝas la mondo" Gaston Waringhien, publikigita en lia verko „Lingvo kaj vivo", estis komentita en 1961/225:90-91 kaj 1962/226:9-10, la tuto eĉ pli larĝe en 1962/226:12-16. Nepra interesaĵo estis la vortaro Ido-Interlingua de B. C. Sexton (1959/213:94). Oni ne forgesis eĉ alian kuriozaĵon, "Arcaicam Esperantom" de Manuel Halvelik (1970/259:29-31). Pavel Mitrovič (Paul Mitrovich) skribis pri kompara vortaro de internaciaj lingvoj surbaze de sia "An Essay on Interlinguistics", en 1965/240:33-35, franca eldono komentiĝis en 1969/257:60-61.

Cosmoglotta ankaŭ rimarkis la leviĝon de intereso pri revivigo de la *Latina* kaj mallonge informis pri la kongreso en Avignon 2.-6.9.1956, kiu estis decida punkto por la - ĝis nun ekzistanta - movado "Latinitas Viva" (1956/191:24). Al la instruado de la Latina estis dediĉita artikolo en 1979/278:4-6, kiu vekis grandan eĥon – la legantoj plejparte plendis pri falsa koncepto de la oficiala Latin-instruado, kiu ne subtenas parolkapablojn (1979/279:28-29).

Al la 125-a jubileo de la aŭtoro de *Volapük*, Johann Martin Schleyer, dediĉis Cosmoglotta artikoleton en 1956/194:66, al kiu aldoniĝis informo pri propagadprelego kaj lingvokurso de Interlingue en Romanshorn kaj St. Gallen ĉe Konstanca lago, kie siatempe estis Volapük multe disvastiĝinta. Okaze de sesdekjariĝo de *Eugen Wüster* oni rememorigis liajn meritojn por la internacia teknika terminologio (1958/207:82-83) kaj poste skribis pri lia verko longan artikolon pri unuigo de teknikaj terminologioj (1959/212:69-76 kaj 1959/213:82-89. En sia artikolo "Lingvo kaj kibernetiko", Willy Wellekens atentigas al la laboro de *Norbert Wiener*, eliranta el problemoj de cirklo-regulado, al graveco de la lingvo kiel komunikadperilo, al rolo de akademioj kiel normigaj instancoj kaj, denove, al internacia teknika terminologio, ankaŭ rilate al IALA (1961/222:33-36). En 1960/220:47-48 oni rememorigas *Woldemar Rosenberger*, lian laboron por Volapuko, Idiom Neutral kaj la revuo Progres. Okaze de la morto de Petro

Stojan aperis la biografio de tiu "veterano de internacia lingvo", priskribanta liajn meritojn por Esperanto (1961/223:61-62).

En 1959/209:32 oni anoncis fondiĝon de *The International Language Association* en Usono, sub prezido de Prof. Mario Pei, kun oficiala organo *International Language Review* sub direktado de Floyd Hardin. Cosmoglotta interesiĝis pri la enhavo de tiu ĉi revuo, ekz. en 1965/238:1-3 skribas A. M. (Alphonse Matejka): "Parley, Tungl, Babm, Safo, Pikto, Globaqo, Concorde, Stiphone, Neo, Unione, Intal! La plejmulto de tiuj nomoj eble signifas nenion por mezuma interlingvisto, sed ili estas pli-mlapli familiaj por legantoj de International Language Review, unu el kies taskoj estas sciigi la legantojn pri novaj projektoj de internaciaj lingvoj". En 1968, Cosmoglotta rimarkis ekeston de nova interlingvistika revuo en Esperanto, *Fokuso* (1968/251:37), kaj en 1969/257:62 anoncis aperadon, ekde 1970, de *Cosmopace*, oficiala organo de samnoma internacia organizaĵo, fondita 1969 en Frankfurto (FRG). Oni informis ankaŭ pri *Progreso*, oficiala organo de Ido-movado (ekz. 1969/257:61).

En kelkaj artikoloj estis pritraktataj *ĝenerale interlingvistikaj* temoj, ekz. pri lingvotipologio kaj tipoj de interlingvoj skribis Jaroslav Podobský en 1956/195:84, pri skematismo kaj naturalismo Alphonse Matejka en 1956/196:3-6. Matejka verkis ankaŭ ampleksan studon pri "colateralisme", t. e. gramatikaj kaj vortaraj variantoj, kaj klarigis danĝeron de ties ekzisto por la lingvouzo. Praktikado de la lingvo gvidas al prefero de certaj variantoj, sed por konservi unuecon de la lingvo, la uzo devas esti oficialigita (1958/202:6-10, 1958/204:36-39). W. Wellekens interesiĝis pri mondlingvismo kiel movado ka pri la tasko de interlingvistiko (1963/234:4) kaj starigis regulojn de natureco en internaciaj lingvoj (1966/242:6-10). Al tio reagis Michel Gloanec en 1966/245:52-55, laŭ kiu natureco kaj regulareco kuniĝas surbaze de iugrada kompromiso. Adrian Pilgrim pledis por Interlingue kiel "lingua franca" en 1972/266:11, aldone klarigis C.E. Sjöstedt kvalitojn de postulata internacia lingvo por la scienco (1972/266:12-14). Pri sociologiaj aspektoj de mondligva movado skribis A. Matejka en 1979/279:17-18.

Interlingua de IALA

Cosmoglotta sekvis kaj komentis la laboron de IALA ekde ties komenco en 1924. En la numero 1950/156:83-84 troviĝas nekrologo de Alice Morris, mecenatino de IALA. Oni mallonge priskibas la historion de tiu ĉi interlingvistika organizaĵo kaj anoncas baldaŭan aperon de *Interlingua-English Dictionary* de Alexander Gode. Estas interese, ke tiu ĉi verko, fakte konkurenca, tuj post la apero en marto 1951 estis aĉetebla en la Cosmoglotta-redakciejo, Interlingue-Institute en Cheseaux (vd.1951/161:44). Unu monaton poste verkis Alphonse Matejka longan recenzon (1951/162:46-51). Li tuj konstatis, ke la publikita vortprovizo de Interlingu***a*** en 90% kongruas kun tiu de Interlingu***e***, se oni ne rigardas ortografion (historian kaj simpligitan) kaj uzon de finaj vokaloj. La elektita vorto en Interlingu***a*** devas troviĝi en minimume tri el kvin kontrollingvoj: itala, hispana, portugala, franca, angla, ev. aldone en la lingvoj germana kaj rusa, sed la definitiva formo ne nepre devas ekzisti en tiuj lingvoj, ĉar ĝi reprezentas rekonstruitan prototipon - ekzemple vortoj *lisie* (glata), *cata* (ĉiu), *mancipe* (aĉetanto), *nonne* (neniam) reale ne ekzistas en iu alia lingvo. Tial la lingvo ne estas sufiĉe elasta kaj iĝas "sklavo de siaj principoj". Male al la "Regul De Wahl", kiu ebligas en Interlingu***e*** regulajn derivaĵojn, In-

terlingua konservas plurajn radikojn, ekz. *ag/act* (agente/actor), *frang/fract* (frangibil/fraction), *ung/unct* (unguento/unction), tiel ke sen lingvistikaj antaŭscioj pri infinitiva kaj supina formoj oni ne povas diveni la ĝustan rezulton. Ankaŭ ortografio kaj prononco enhavas esceptojn. Tamen, la simileco inter ambaŭ interlingvoj estas tiom granda, ke certe eblos iu racia sintezo inter ili, konkludis Matejka en 1951.

Al detala komparo de ambaŭ sistemoj kun rekomendoj de korektoj en Interlingue estis dediĉita la numero 1967/246. La aŭtoro, doktoro pri matematiko C.E. Sjöstedt, kiu skribis por Cosmoglotta plurajn prilingvajn artikolojn, ekz. pri sicenca kaj teknika terminologio, verkis ankaŭ la unuan grandan sciencan verkon en Interlingue "Le axiome de paralleles de Euclides a Hilbert" kun 972 paĝoj (vd. 1967/246:16 kaj recenzon en 1969/254:1-7). Rilate al tiu ĉi libro estis menciita ankaŭ la bilioteko en La Chaux-de-Fonds kiel kolektejo de verkoj en internaciaj lingvoj (1969/255:26-27), kaj samkajere estas laŭdata Claude Gacond kiel "unu el relative raraj esperantistoj, kiuj ne nur sekvas interlingvistikan evoluon, sed favoras la kontaktojn inter esperantistoj kaj apogantoj de aliaj internaciaj lingvoj" (1969/255:31). Pli ampleksa raporto pri la biblioteko troviĝas en 1972/268:41-43. Menciindas, ke Matejka vivis en La Chaux-de-Fonds jam ekde 1937 (komp. Künzli 2006).

Ni ne forgesu, ke sur la kampo de naturalismaj planlingvoj estis Occidental/ Interlingue ĝis tiam senkonkurenca (precipe post la morto de Otto Jespersen, aŭtoro de Novial), ĉar ĉiuj novaj projektoj estis kvazaŭ imitaĵoj de ĝi. Tio validis ankaŭ por Interlingua, sed ties impona vortaro kun 27 000 vortoj, farita de profesiaj lingvistoj, vekis grandan respekton, kvankam ĝi principe nur konfirmis la ĝustecon de la vojo, komencita de De Wahl (pli detale vidu ankaŭ Back 2001). La senato de Interlingue-Union kaj la Interlingue-Academie pritraktis la proponojn, ke (1) Interlingue-Union iĝu kolektiva membro de IALA kaj (2) Interlingue-Union restu favora al estonta aktiveco de IALA kaj morale subtenu ĝin. La unua propono ne estis akceptita, sed jes la dua, do praktike kunlaboro kaj subteno de Interlingua (1952/169:27). Oni tiam evidente ne antaŭvidis, ke sen financado de s-ino Morris, IALA ne plu longe ekzistos.

Artikolo de Alexander Gode kun "revolucia" aserto, ke la internacia lingvo ne estas mondsavilo, sed instrumento por interkompreniĝi, kaj la „malkovro", ke vortoj ne havas identan nocian enhavon en diversaj lingvoj, vekis rideton ĉe interlinguanoj, kiuj pri tiaj aferoj estis jam delonge diskutintaj sur la paĝoj de Cosmoglotta (vd. 1952/171:59). Oni komencis kritikeme esplori Interlingua-n el la vidpunkto de naturalismo (1952/169:15 kaj 21), kompari kaj analizi tekstojn (1952/171:50-52) kaj gramatikon (1952/173:73-79), kritiki nekoherecon de derivaĵoj (1953/174:8-10), serĉi arkaismojn kaj modernismojn (1953/175:19-21) kaj klarigi evoluon de Interligua (1954/180:22-26) por rekonstati, ke ambaŭ lingvoj estas ege proksimaj (1953/178:70-71).

En 1953/175:18 troviĝas la fatala sciigo pri la likvidigo de IALA: laŭ la lasta numero de "Novas de IALA" el 31-a de marto 1953, per eldono de la vortaro kaj de la gramatiko de Interlingua, la laboro de la organizaĵo estis plenumita, tial ĝi likvidiĝis. Pri plua evoluo de Interlingua kaj ties uzo en sciencaj rondoj zorgos "Science Service", kien transiris funkciuloj Alexander Gode kaj Hugh E. Blair . "Likvidigo de IALA fermas unu ĉapitron en la historio de mondlingvo, pri kiu *ni* ankoraŭ havas ion por diri", konkludas la redakcio de Cosmoglotta. Simbole, en la antaŭlasta kajero de "Novas de IALA" en februaro

1953 estis publikigita foto de granda pioniro de interlingvistiko (sic) Edgar de Wahl (vidu 1953/175:31).

Pli detale kaj kun komentoj revenis al la temo Alphonse Matejka en 1953/178:66-69. La enormaj monsumoj, investitaj en lingvistikajn esplorojn de IALA, estis malproporciaj al la fina rezulto, t.e. publikigo de Interlingua. La funkciigo de Interlingua estis neniel preparita. La aŭtora teamo konsistis el lingvistoj, kiuj ne havis ajnan praktikan sperton kun funkciantaj internaciaj lingvoj. La situacio post la morto de s-ino Morris estis enigma: "Kiel eblas, ke tiom grandanima mecenatino, kiu el IALA faris sian vivoverkon, ne testamentis eĉ unu cendon por ebligi al siaj kunlaborantoj daŭrigon de la komencita laboro?", demandas Matejka. Kiun utilon havas la arĥivoj de IALA, se ili ne estas publike alireblaj? Kiu, krom angloparolantoj, lernos la lingvon, se eĉ ne Angla-Interlingua vortaro ekzistas[5]? La ĉefverko de IALA povas esti konsiderata baza trezorejo kaj inspira fonto pro interlingvistoj, konkludas Matejka, ĉiam ankoraŭ ne antaŭvidante seriozan konkurencon. La kunsido de svisaj funkciuloj de Interlingue-Union eĉ du jarojn poste pledis pri intersistemaj kontaktoj, kiuj "certe estas valoraj kaj informigaj" (1955/189:94).

Traduko de la recenzo de André Martinet kun observaĵoj similaj al tiuj de Matejka publikiĝis en 1957/199:49-54. Martinet krome konfesis al la redakcio de Cosmoglotta, ke la de li preferata varianto de Interlingua estis multe pli proksima al Interlingue, ol tiu oficialigita de Gode. En tiuj cirkonstancoj estis ŝokiga la klopodo de Ric Berger transirigi ĉiujn interlinguanojn amase al Interlingua de IALA, kiun li opiniis pli bona ol la lingvon de De Wahl. Lia herezo kaŭzis dubojn kaj ŝanĉeliĝojn en Interlingu*e*-rondoj (1957/199:55-59), precipe postkiam li engaĝiĝis en "Revista de Interlingu*a*". La kompleta jubilea numero 200 (1957) de Cosmoglotta estis dediĉita al komparo de ambaŭ sistemoj, kun gramatikaj kaj tekstaj analizoj de Alphonse Matejka. La iama ideo pri natura fuzio de ambaŭ lingvoj tamen montriĝis nerealisma: la nova parenca lingvo iĝis rivalo. Fritz Haas verkis eseojn „Kial Interlingua Gode ne povas iĝi mondolingvo" „Kio vere estas la Interlingua Gode" kaj "Tria serio de defektoj de Interlingua de Gode". Similaj skribaĵoj poste aperadis ofte, ekz. "Neakcepteblaj defektoj de Interlingua de Gode", eldonita de Interlingue-Service en Winterthur (vd. 1958/203:31-32). En la artikolo "Utopio aŭ realaĵo" en 1957/201:83-87 Kurt Hamburger transiris en defensivon, pledante por akcepto de elprovita kaj praktikata internacia lingvo malfavore al novaj eksperimentoj.

La reciprokaj rilatoj iĝis tre komplikaj. Stefano Bakonyi, alia fama dizertinto de Interlingu**e** al Interlingu**a**, apogis kreon de la lingvo sur konstruita prototipo kaj daŭre opiniis sintezon de ambaŭ sistemoj ebla (kp. 1970/261:40), kaj Matejka siavice kunlaborprete atentigis, ke ambaŭ lingvoj baziĝas sur la samaj principoj (1963/230:53-63). Al la verkoj de Bakonyi donis atentemon ankaŭ artikoloj en 1963/232:33-41. Bakonyi, kune kun siaj amikoj Hugo Fischer kaj André Schild, deziris toleremon kaj interkonsenton de ambaŭ partioj, sed la problemon analizis ankaŭ Ric Berger en "Revista de Interlingua" (vd. 1966/242:14, 1970/258:2-7, 1970/259:19-21 k.a., praktike temas pri dialogo inter Berger kaj Matejka sur la paĝoj de iliaj respektivaj revuoj), kiu ne pretis fari kompromi-

[5] Nur en 1959/210:43 anonciĝis 84-paĝa „A Concise English-Interlingu*a* Dictionary" de Woodruff W. Bryne, dum „English-Interlingu*e* Dictionary" havis 422 paĝojn kaj 14000 vortojn.

sojn, pretendante, ke la aŭtoro de Interlingua mem rifuzis ilin. En 1970/258:2-7 Matejka eksplicite diris, ke la kompromisa solvo estis neniam proponita oficiale, Gode do ne havis kaŭzon ĝin rifuzi. Okulfrapas tamen la simileco de ambaŭ lingvoj, kiuj ŝajnas esti parencaj dialektoj. L.M. de Guesnet eĉ konstatis, ke parolantoj de ambaŭ lingvoj komprenas sin reciproke tre bone (1963:23-25). Oni do povis prave atendi, ke dum la uzado okazos iu spontanea kuniĝo. Okaze de la nekrologo de Alexander Gode en 1971/262:1-4, Matejka resumis, ke Edgar de Wahl estis la unua interlingvisto, kiu firmigis la pozicion de naturalisma skolo en interlingvistiko, kaj Gode demonstris ĝian taŭgecon apoge al sciencaj principoj praktike kaj vastskale, restante tamen en la sama (t.e. naturalisma) kampo. Interesa letero, malkovranta Gode kiel "interlingviston kontraŭ propra volo" publikiĝis en 1971/264:42-43. Al la temo revenis ankoraŭ en 1980/283:18-19 Dr. Helmut Ruhrig per letero en Interlingua, en kiu li aprezas la laboron de De Wahl; en la respondo, Matejka konfesis, ke li estis "neoficiale" kunlaborinta kun Schild pri sintezo de ambaŭ lingvoj.

Cosmoglotta atenteme observis la progreson de Interlingua, ekeston de "Union Mundial pro Interlingua" (*UMI*) kaj ties organo "Currero International", raportis pri uzado de la lingvo en resumoj de prelegkolektoj kaj revuoj pri medicino kaj psikiatrio (vd. 1962/227:29-30), pri enhavo de "Le Foro", revuo en Interlingua eldonita de Stanley Mulak en Usono, al kiu oni eĉ reagis per kompargramatika artikolo en 1963/230:5-8, pri bulteno de "The American Interlingua Society", "Interlingua at Work" k.s. Ankaŭ interesaj artikoloj el "Currero International" estis komentataj en Cosmoglotta, ekz. tiu pri Interlingua en parola uzado en 1963/231:27-29. En la artikolo pri fonetika principo de Interlingua (1968/253:64-65), A. Matejka kritikis eldirojn de Gode kaj tezojn publikigitajn en "Revista de Interlingua", kio montras, ke li daŭre informiĝis pri la konkurenco - eĉ post la morto de Gode li aperigis studon pri vokalaj finaĵoj en Interlingua (1972/268/36-39). En 1964/237:57-59 anonciĝis eldono de la adresaro de UMI kun 402 nomoj kaj kun adresoj de la regionaj organizaĵoj, tamen kun konstato, ke inter la nomoj troviĝas ankaŭ tiuj de (simpatiantaj?) esperantistoj, idistoj kaj okcidentalistoj.

En 1972 publikigis Ric Berger 400-paĝan libron en Interlingua "Historia del Lingua International". Laŭ la recenzo en 1972/269:52-54, la verko montriĝis unuavide alloga kaj riĉe dokumentata, sed anstataŭ esti laŭmetoda eskpliko de historiaj faktoj, ĝi liveris buntan kaleidoskopan legaĵon. Berger elektis taŭgajn dokumentojn por propra interpretado de faktoj kun la celo aloporti gloron al Interlingua de IALA.

Lingvopolitiko

Interesa rimarko koncernas la uzadon de lingvoj dum internaciaj kongresoj en Eŭropo: en 1949 la plej uzata estis la franca, sekvis la angla. Oni opinias, ke la konstruo de internacia lingvo devus respekti tiun ĉi fakton (1950/152:29). Recenzita libro de interlinguano[6] Einar J. Rustad "Europas Folk! Las oss slutte oss samen!"antaŭvidas "Unuiĝintajn ŝtatojn de Eŭropo" laŭ usona aŭ svisa modelo, kun komuna valuto, kie ĉiu nacio kaj ĉiu nacia minoritato konservos sian lingvon kaj kulturon, kun komuna interlingvo konstruita surbaze de komunaĵoj en eŭropaj lingvoj – ideoj, kiuj eĉ post kvindeko da

[6] Cosmoglotta uzas terminojn „coidealistes"(samideanoj, do simpatiantoj de internaciaj lingvoj ĝenerale) aŭ „interlinguanes" (interlinguanoj, t.e. [eksaj] okcientalistoj).

jaroj realiĝis nur parte (1954/183:71-74). En majo 1956 okazis en Arnhem, Nederlando, internacia kongreso kun temo "Lingva diverseco kiel eŭropa problemo", kiu pritraktis internaciajn lingvojn kiel unu el la ebloj de komuna interkompreniĝo. W.E. Collinson prezentis tie Esperanton kaj A. Koning Interlingue – pri Interlingua de IALA ne estis mencio (1956/193:61-63).

Rivaleco inter Interlingue, Esperanto kaj Ido, kiu iom mildiĝis komence de la svisa periodo, rekreskis post la mondmilito. Ric Berger en sia artikolo "Politiko kaj internacia lingvo" (1950/152:19-21) frontis malamikaĵojn de esperantistoj kaj idistoj. Cosmoglotta observadis kaj komentadis la lingvopolitikajn strebojn de Esperanto, precipe ĉe Unesko: pri Unesko kaj internacia lingvo temis en 1950/151:3, pri Esperanto en Unesko 1953/174:4-5, en 1954/180:17-20 refoje en 1954/181:33-36 kaj 1954/182:52-55, malkovrinte la "grandiozan blufon" pri 16 milionoj da esperantistoj (1954/181:47) kaj raportante pri "dubinda rezulto" en Montevideo (1955/184:1-4). Kial Esperanto, lingvo ne bazita sur sciencaj lingvoesploroj kaj ne senmanka, atingis pli grandan popularecon, ol dum jaroj evoluigataj Interlingue kaj ties scienca fratino Interlingua, estas fakto lingvistike ne klarigebla. Certe, ankaŭ esperantistoj uzadis diversajn lingvopolitikajn strategiojn, sed principe iliaj ŝancoj ne estis pli grandaj ol tiuj de interlinguanoj. Per la montevidea rezolucio ne finis la klopodoj atentigi Uneskon pri planlingvoj, la temo estis rediskutata ekz. en 1959/208:12.

En 1954/180:28 troviĝas rimarko de K.F. (Kurt Feder) pri maŝina tradukado, farata en Usono por lingvoj germana, rusa kaj angla. Ĉu temas pri revolucia okazaĵo, kiu anstataŭos lingvolernadon? Feder ne kredas tion, ĉar la maŝintradukado koncernas nur fakajn tekstojn. Du jarojn poste (1956/191:26), Cosmoglotta informis pri misfunkcio de la maŝina tradukado, per kiu la frazo "out of sight, out of mind" post retraduko el la rusa sonis "idiot invisibil". Kurt Hamburger tamen en plua artikolo opiniis, ke interlingvistoj devas interesiĝi pri tia tradukado kaj klarigis la funkcion de teknika interŝtupo (1956/193:55-56). Tri jarojn poste oni konstatis, ke la elektroniko faras progresojn kaj la maŝina tradukado funkcias (1959/212:65-67) kaj dediĉis al ĝi ankoraŭ multe da atentemo (1960/214:2-6 kaj 1960/215:23-28) kun speciala prizorgo de internaciaj lingvoj.

En 1969/255:29-30 oni raportis pri aktuala pamfleto de la redaktoro de revuo Esperanto, Teo Jung, kun la titolo "Tri homoj flugis al luno...sed mondlingvanoj kverelas". Ŝajnas, ke interlinguanoj estis ofte provokataj de esperantistoj, kvankam la lastaj reprezentis 98% de la internacilingva movado. Oni demandas sin, kial tiuj 2% (do adeptoj de Ido, Interlingua, Interlingue kaj aliaj kune) povis entute malutili al la esperantistoj.

Interesa estas ligiĝo de Interlingue al eŭropa lingvopolitiko. En 1971 publikigis Harald Lorenz broŝuron kun la titolo "Novlatin – li natural lingue paneuropan", fakte propagandon por Interlingue. En Cosmoglotta aperis kelkaj artikoloj pri eŭropaj lingvoproblemoj, ekz tiu de Adrian Pilgrim en 1979/281:53-54. Pri Interlingue kiel ebla tuteŭropa lingvo interesiĝis Hubert Klebing, el la bavara sekcio de Eŭropa Unio. En la letero publikita en 1980/283:21 li bedaŭris, ke Interlingue ne estis proponita dum la kolokvo pri lingvopolitiko en Eŭropa Akademio Otzenhausen en 1979, kiu okazis kunlabore kun Eŭropa Klubo kaj ALEUS. Rilate al eŭropeco, la redakcio reparolis pri la ŝanĝo de la nomo de Occidental okazinta antaŭ tridek jaroj (1980/282:4-6); kun la ekesto de Eŭropa

Unio, la malnova nomo ne plu estis sentata kiel malfavora. Se oni parolis pri "Eŭropo", temis pri Eŭropa Unio, do efektive denove pri la okcidento.

Movado

La ĉefa movad-organo oficiale restas Interlingue-Union, konsistanta el (1) individuaj kaj kolektivaj membroj, (2) senato, (3) centra oficejo kaj (4) landaj reprezentantoj. La plej alta lingva organo, Interlingue-Academie, estis prezidata de Alphonse Matejka, sekretario estis Dr. Carl Hanns Pollog, membroj Kurt Feder, L. M. de Guesnet (prezidanto de Interlingue-Union), Dr. Fritz Haas, Dr. Fr. Mascanzoni, Prof. G. Michaud, Dr. H. Nidecker, Englebert Pigal, Jaroslav Podobský, Wilfrid E. Reeve kaj Carlos Varela, korespondaj membroj Wilhelm Blaschke, Kurt Hamburger, Dr. Hans Homolka, Fred Lagnel, A. w. S. Raxworthy kaj J. Roux (1956/194:70-72). En 1985/286:2 publikiĝis la lasta listo de "comité direktiv": Erich Werner, St. Galllen, Svislando – Adrian J. Pilgrim, Baldrine/insulo Man, Britio – Tomáš Ondráček, Žd'ár, Ĉeĥio - Peter H. Fink, Neuwied, Germanio - F. Johann Krüger, Amsterodamo, Nederlando – Traugott Aebi, Ostermundingen, Svislando – Lawrence Sharpe, Chapell Hill, Usono.

Krom Cosmoglotta, en 1950 aperadis en Interlingue jenaj revuoj: en Svislando *Cive del Munde*, en Ĉeĥoslovakio *Voce de Praha*, en Svedio *Sved Interlinguist*, en Britio *International Memorandum*, en Francio *Interlinguistic Novas*, *Jurnale Scolari International, Buletine Pedagogic International, Super li Frontieras.* Krome, regulan rubrikon por Interlingue enhavis *Vie libre* en Avignon, *Revue internationale de sténographie* en Biel, *Aetne Post* en Catania kaj *Europa*, organo de "Europan Union" en Basel (1950/153:35), ekde 1959 *Exon-Journalen* en Svedio (1959/209:30). Plue, en 1956 publikiĝis en Prago *Globus Corespondent*, en Nederlando *Interlingue-Informationes* (1959 alinomita al *Lingue European*), kaj *Revúe Shakistic International*, en Svislando *Le Currero del Mundo* (1956/194:78). En 1958 ekzistis *Interlingue-Postillion* en Germanio kaj *Novas de Oriente* en Japanio. *Interlingue Adressarium* tiam enhavis adresojn el 40 landoj. (1958/205:77,79). En 1959 fondiĝis *Amicitie european* en Svislando (1959/211:59, 1960/215:47). En 1967 startis popularscienca internacia revuo *Teorie e practica* en svisa-ĉeĥoslovaka kunlaboro (vd. 1967/247:31), en 1971/264:46 oni raportis pri periodaĵo *Novas in Interlingue*, aperanta en Ĉeĥoslovakio malgraŭ malfavoraj politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj.

Association pro international servicie (APIS) havis propran organon *Informator*, eldonatan unue en Svislando kaj transprenitan en 1949 per Jan Amos Kajš en Brno. Tiu revuo estis grava propagandilo de Interlingue. La unuopaj kajeroj enhavis i.a. liston de informantoj (kiuj tradukadis modelajn informaciajn tekstojn en siajn etnolingvojn kaj zorgis pri publikado en lokaj revuoj), liston de turismaj eventoj kaj informojn pri turismaj kaj kulturaj vizitindaĵoj, korespondan servon, katalogon de libroj en Interlingue, reklamojn pri diversaj publikaĵoj kaj servoj (1951/160 :25-26). Ĝi foje aperis kiel aldonaĵo al Cosmoglotta.

Novajn aktivecojn reprezentis i.a. revivigo de *Association proletari interlinguistic* en Parizo kaj Kopenhago, kun la celo disvastigi Interlingue inter la monda proletaro (1950/151:5). La asocio organizis internaciajn kunvenojn, en kiuj tamen rifuzis partopreni politike neŭtralaj organizaĵoj, ekz. *Union Pedagogic Interlinguistic International*

(vd. 1951/159:7). En unuopaj landoj ekzistis pluraj aktivaj kluboj kaj asocioj, kiel *Sviss Association por Interlingue* en Basel (vd. ekz. 1950/157:102-103, 1951/163:66-67), aŭ la ofte menciata *praga grupo*, kies "idealismo" estis eĉ kritikata (vd. 1952/169:22-24), sed kiu daŭre aktivis, "ne ĉesante kultivi la lingvon" (1955/184:115). Ĝi propagandis Interlingue inter sindikatanoj, dum junularaj festivaloj kaj en turismo, organizis informprelegojn kaj somerajn tendarkursojn, informis kulturministerion k.s. (1957/201:94-95). En 1956, la ĉeĥoj iniciatis komunan Interlingue-komitaton por orienteŭropaj socialismaj landoj Ĉeĥoslovakio, Bulgario, GDR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Jugoslavio (1956/195:94). El ĝi kreskis FIC (Federativ Interlingue-Colegie) , kiu havis 30 kunlaborantojn en 18 landoj kaj tri grupojn kun specialaj taskoj (1966/243:29-30). La koresponda klubo kun la revuo "Corespondent", gvidata de František Mácha, Jaroslav Tichý kaj Vojtěch Kopecký, havis en 1962 986 membrojn kaj 627 kandidatojn (raporto en 1962/227:31-32). El la nekrologo kaj biografio de la ĉeĥa nestoro Jan Amos Kajš (1955/186:37 kaj 1956/193:49-53) oni ekscias, ke li estis, post De Wahl, la unua okcidentalisto entute, kaj kun Hynek Pášma kaj Jaroslav Podobský li formis la oran triopon de la movado.

Comoglotta raportis ankaŭ pri aliaj gravaj aktivuloj okaze de iliaj vivjubileoj, ekz. pri Hermann Tanner (1956/192:33-34), Louis M. de Guesnet (1956/192:35, 1961/222:44-45, 1966/242:1-2), Engelbert Pigal (1959/209:26-27), Karl Janotta (1960/218:78-79), Floyd Hardin (1961/222:46 kaj 1966/243:27-28), Edouard Bieller (1962/227:27), Fred Lagnel (1970/261:49-51) kaj - pli ofte – en nekrologoj, ekz. Prof. Theodor Krebs (1957/201:91), Kaspar Strickler (1958/202:15), Prof. Albert Debrunner (1958/203:27), Morris de Ketelaere (1959/210:39-40), Thor V. Bäckström (1960/215:31), A. Guérard (1960/214:1-2), Ludwig Klaesi (1962/228:33-38), Kurt Hamburger (1962/229:49-51), Louis Boutreux kaj Jaroslav Podobský (1962/230:10), Franz Houdek (1962/231:22), A. Koning (1962/231:27), Maurice Martinet (1965/238:11), Kurt Feder (1965/241:51-52), Vilém Veverka (1966/242:4-5), Emil Lienhard (1967/246:14), Ludwig Weber (1968/251:30), Josef Kresina (1969/256:37-38) Fritz Haas (1971/265:57-58), Dr. Carl Hanns Pollog (1979/278:15), Dr. Hans Homolka (1979/279:27), Dr. C.E. Sjöstedt (1979/280:46). Ĝenerale, la Interlingue-aktivuloj havis gimnazian ĝis universitatan edukiĝon, konis plurajn internaciajn lingvojn kaj havis spertojn kun movada kaj publikada laboro.

Raporto de Walter Raedler kaj Josef Ponnier pri konfereco de interlinguanoj en 1953/174:10-11 sciigas pri kunlaboro de germanoj el GDR kun okcidentberlinaj kolegoj. Ili proponis starigi tri kunlaborantajn centrojn (en Germanio okcidenta, G. orienta kaj en Berlino) kaj strebi aktivigi interesitojn en tuta Germanio – menciataj estas "ĉirkaŭ 400 jam registritaj interesatoj". En 1955/188:69-70 oni publikigis demandilon de prepara komitato de nova komungermana Interlingue-organizaĵo.

Per unupaĝa artikolo (1957/197:29) estis sciigita intereso pri Interlingue en plurlingva urbo Sacramento en Kalifornio, kaj lingvokurso en "Sacramento State College". Intereson pri Interlingue en Sovetunio oni dokumentis en 1960/217:63-64.

En unuopaj landoj, ĉefe en Svislando, Britio, Ĉeĥoslovakio kaj Francio, okazadis landaj jarkunvenoj kaj konferencoj de interlinguanoj, sed Interligue-Union ne organizis internaciajn kongresojn (kompareblajn ekzemple kun UK-oj de UEA), kvankam oni en

Cosmoglotta plurfoje pridiskutis tion. En la jaro 1958 okazis la unua, dutaga internacia kunveno en St. Gallen, dum kies preparo oni jam atentigis, ke ĝi ne povas fari decidojn validajn por la tuta movado (1958/204:48 kaj 1958/206:65-68). Multaj eksterlandanoj ne povis eniri Svislandon pro ekonomiaj aŭ politikaj kialoj (ekz. GDR-anoj kaj Ĉeĥoj ne ricevis elirvizojn), tial alvenis kvindeko da salutmesaĝoj kaj telegramoj el 15 landoj. Dum la konferenco oni pritraktis metodojn de propagado kaj aprobis la eksperimenton kun "libera sekcio", startigitan de la redakcio de Cosmoglotta (1958/204:52-54).

Al la aktivado en unuopaj landoj estis denove dediĉita rubriko "*kroniko*", malaperinta dum la milito, kiu raportis pri kunvenoj, kursoj, publikaĵoj, instruferiadoj kaj propagado en etnolingvaj revuoj k.s. En tiu ĉi rubriko aperis ankaŭ sciigoj pri eldonaĵoj de bulteno "Novas de IALA" kaj de Interlingua-gramatiko en 1952, kio montras, ke tiam oni ne sentis ĝin kiel konkurencan. Laŭ la raportoj, la movado en la kvindekaj jaroj estis tute vigla. Nacilingvaj revuoj en Ĉeĥoslovakio, Svedio, Svisio, Britio, Brazilo, Francio, Germanio kaj foje en aliaj landoj publikigis favorajn artikolojn pri Interlingue, ekzistis korespondaj kursoj, lernolibroj, gramofondiskoj kaj sonbendoj. Foje aperis konsiloj kaj raportoj pri propagado, ekz. artikolo de Jaroslav Tichý en 1967/249:58-60. La plej multaj sciigoj pri aktiveco venis el Ĉeĥoslovakio, eĉ post la jaro 1968, kiam la tiea politika reĝimo pliakriĝis: laŭ 1969/254:16, la redakcio de Cosmoglotta ricevis el Ĉeĥoslovakio interalie kvar freŝajn broŝurojn, inkluzive de bulteno "Zprávy československých interlinguistů" , regule eldonita dum la jaro 1968. Parenteze, ĉeĥaj esperantistoj ne havis kompareblan periodaĵon ĝis 1969, kiam fondiĝis Ĉeĥa E-Asocio.

Estas malfacile fari iun liston de la *aŭtoroj* de Cosmoglotta, ĉar oni ne ĉiam menciis la plenajn nomojn. En enhavaj superrigardoj listiĝas kutime nur artikoloj laŭ unuopaj temoj, kiel bibliografioj, kroniko, lingvo, movado, nekrologoj, diversaĵoj k.s. Pluraj aŭtoroj skribis sub pli aŭ malpli transparentaj ŝifroj/monogramoj (K.H., A.M., J.K., F.L. ktp.) aŭ pseŭdonomoj (Dr. Homo, Interlinguisticus, Lismar, Novus, Mosquito, Li esperantiste di servicie, Humanist k.a.). La plejmulto de aŭtoroj, abonantoj kaj interesitoj pri Interlingue apartenis al la generacio, kiu konatiĝis laŭvice kun Volapük, Esperanto kaj Ido, trovante poste en Occidental-Interlingue la plej estetikan (esence naturalisman) solvon. Kelkaj - precipe pli junaj – transiris al Interlingua de IALA, kiu tamen ne montriĝis multe pli sukcesa, kvankam ĝi imponis per sia scienca deveno. Tiuj, kiuj restis fidelaj al Occidental-Interlingue, ne sukcesis enstuziasmigi ankaŭ la sekvantan generacion. La nuna Cosmoglotta servas al interesitoj pri la lingvo, kiu ludis sian rolon en la historio de interlingvistiko. En la hodiaŭa epoko, regata per merkat-racia prefero de la Angla unuflanke kaj per degradigo de ligvokonstruado al intelektula interreta hobio aliflanke, restas Occidental-Interlingue kun sia revuo Cosmoglotta nostalgia okupo por specialistoj.

Kune kun regado de interreto en la informa sfero, la nuntempaj aktivecoj de interlinguanoj koncentriĝas precipe ene de tiu ĉi komunikilo. Ekirante ekzemple de ĉefpaĝo http://ie.wikipedia.org/wiki/Principal_págine, oni venos al la konciza gramatiko (http://ie.wikibooks.org/wiki/Resume_de_gramatica_de_Interlingue_Occidental, al vortaroj Interlingue - angla, franca, germana kaj Esperanta kaj al pli ol 900 Wikipedia-artikoloj en Interlingue. Serioze informas ankaŭ la angla Wikipedia-versio sub http://en.wikipedia.org/wiki/Occidental_language, samkiel la samteksta germanlingva http://de.wikipedia.org/wiki/Interlingue. *Interlingue-Union*, kies oficiala sidejo estas

momente en Svislando, havas sian paĝon http://www.interlingue.org/index.html. Sur ĝi aperas la statuto, laŭ kiu la supera instanco de IU estas sesmembra „Comité Directiv" kaj la lingva instanco ĉiam restas la kvinmembra Akademio, al tiu apartenas ankaŭ la redaktoro de Cosmoglotta. Plue samloke troviĝas ligoj al Interlingue-organizaĵoj en Germanio, Kanado, Rusio kaj Usono, al biblioteko kun novaj kaj malnovaj tekstoj, kaj vortaroj Interlingue – ĉeĥa kaj Esperanta. Diversaj aktivecoj, kiel Interlingue-kursoj, filmoj, legaĵoj kaj renkontiĝoj estas ofertataj ekz. de „Occidental Auxlang Comunité" sub http://www.auxlang.org/ kaj de interreta „Auli Università Occidental" sub http://www.cosmoglotta.com/dwiki/bonvenit_al_auli_universita_occidental_document-wiki. Krome interesiĝas pri Interlingue diversaj aliaj instancoj, kiel „Omniglot, Writing Systems & Languages of the World", kolektanta skribsistemojn de diversaj lingvoj (http://www.omniglot.com/writing/occidental.htm), traduka organizaĵo „Fixenet" kun 2500 kunlaborantoj, ofertanta tradukojn inter ĉiuj oficialaj lingvoj de la mondo (http://www.finetext.de/uebersetzungen-sprachinfo/Interlingue.php) kaj, kompreneble, kolektantoj kaj amikoj de planlingvoj ĝenerale, kiel ekz. Sebastian Hartwig, Donald Harlow, James Chandler, Morten Svensen, Jay Bowks, Richard Harrisson k.a., kiuj mencias Interlingue sur siaj pritemaj paĝoj kaj storas dokumentojn pri ĝi, ekzemple sub http://www.kafejo.com/lingvoj/auxlangs/ie/index.htm. Babili pri kaj en Interlingue oni povas i.a. ene de yahoo-grupoj: http://groups.yahoo.com/group/occidental/info.html.

Literaturo

Barandovská-Frank, Věra (2006): Revuo Kosmoglott en interlingvistika fono. grkg/Humankybernetik 2006/47/4:197-204. (2007a): Rolo de Cosmoglotta por la stabiligo de Occidental. 2007/48/2:80-92. (2007b): Cosmoglotta survoje de Occidental al Interlingue. 2007/48/3:123-138

Back, Otto (2001): Occidental und seine strukturellen Besonderheiten, en: Detlev Blanke (eld.): Zur Struktur von Plansprachen. GIL Berlin. p. 48-59

Cosmoglotta 1950 – 1954/1 Cheseaux: Interlingue-Institute. 1954/2 – 1962/3 St. Gallen: Interlingue-Centrale. 1962/4 – 1980/4 Cheseaux: Interlingue-Institute. 1985 –2007 St. Gallen: Interlingue-Union.

Künzli, Andreas (2006): Universalaj Lingvoj en Svislando. Svisa Enciklopedio Planlingva. Schweizer Plansprachen Lexikon. La Chaux-de-Fonds. p. 853-874

Ricevite 2007-12-28

Adreso de la aŭtoro: Věra Barandovská-Frank, Kleinenberger Weg 16, 33100 Paderborn
vera.barandovska@uni-paderborn.de

Cosmoglotta und Interlingue (Knapptext)

Die Zeitschrift Cosmoglotta war sehr wichtig für die Entwicklung und Verbreitung der Plansprache Occidental, deren Namen 1949 aus politischen Gründen auf *Interlingue* geändert wurde. Drei Jahre später veröffentlichte Alexander Gode ein großes Wörterbuch der *Interlingua* von IALA (International Auxiliary Language Association). Diese Sprache ist der Interlingue sowohl mit ihrem Namen, als auch mit ihrer Struktur sehr ähnlich. Während der Cosmoglotta- Redakteur Alphonse Matejka für die Fusion beider Sprachen plädierte, hat sich ein anderer langjähriger Cosmoglotta- Mitarbeiter Ric Berger für aktive Mitgliedschaft in Interlingua-Organisation entschieden. Die weitere Geschichte beider Sprachen, als auch einiger anderen Plansprachen, werden auf den Seiten der Cosmoglotta reichlich dokumentiert.

Riĉa kaj sukcesa interlingvistika sesio en UAM (01.-09.02.2008)

La nuna interlingvistika grupo ĉeestis sian 6-an kaj lastan sesion en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (PL). La persistaj 18 gestudentoj (el 10 landoj) partoprenis entuziasme la prelegojn kaj praktikan laboron en tri specialiĝoj: komunikado, lingvistiko kaj metodiko.

Okazis kurso pri interkultura komunikado far prof. Humphrey Tonkin (lingvo kaj socio), Michael Farris (signolingvo kaj parolata lingvo); pri radia komunikado far Barbara Pietrzak (longjara gvidantino de la esperantaj elsendoj de Radio Polonia, nun ĝenerala sekretario de UEA); pri sociologiaj aspektoj de komunikado far d-ro Zbigniew Galor, pri vortospecoj kaj denaskismo far d-ro Balázs Wacha (Blazio Vaha).

La metodikan specialiĝon reĝisoris d-ino Katalin Kováts, kurson pri metodiko gvidis Maria Majerczak, metodikistino el la Jagiellona Universitato (Krakovo) kaj kontribuis Zsófia Kóródy kaj Ilona Koutny. La partoprenantoj havis eblecon testi sin mem kaj samtempe la unuan C1-nivelan teston (el la novtipa lingvoekzameno, kiun ILEI ellaboras kun la budapeŝta lingvoinstituto ITK por akreditigo).

La Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI decidis kunlabori en la formado de Esperanto-instruistoj. La kontrakto inter la du institucioj nun subskribiĝis.

Enkadre de la komuna programo kaj formado estis ebleco jam en septembro aliĝi al la metodika specialiĝo de la Studoj, kiu realiĝas en la studjaro 2007/08. La ses aliĝintoj (el 5 landoj) krom la komunaj metodikaj kursoj kaj ekzamenoj povis partopreni lingvan perfektigon, minikursojn pri literaturo kaj gramatiko.

Per tiu ĉi jaro la Interlingvistikaj Studoj atingis 10-jarojn da ekzistado, pro tio la 18-an ĝis 20-an de septembro 2008 okazos festa interlingvistika simpozio kaj novaj aliĝantoj estas atendataj. (informoj: interlin@amu.edu.pl).

Ilona Koutny
gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Prov-SUS en Bosnio kaj Hercegovino

Dimanĉon, la 31-an de aŭgusto 2008, komenciĝos "pionira" SUS de AIS San Marino en la urbo Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino). Kiel "prov-SUS" tiu aranĝo ne havas numeron, sed nomiĝas simple laŭ la lando.

La Bosnia kaj Hercegovina prov-SUS okazos en la universitato de Banja Luka, bulevar vojvode Petra Bojovica 1-a. La inaŭguro komenciĝos la 31-an de aŭgusto je la 17-a horo. Antaŭe, je la 16-a horo, okazos kunsido de la Subtena Sektoro de AIS. La sciencaj kursoj okazos de lundo al jaŭdo; vendrede kaj sabate, la 5-an kaj 6-an de septembro, okazos publikaj studfinaj ekzamenoj, ĝenerala asembleo de la Scienca Sektoro kaj Solena Fermo. Sciencaj prelegoj okazos laŭ programo surloke anoncota.

Detaloj de la programo aperos en Interreto (www.ais-sanmarino.org). Aliĝojn kaj proponojn por kontribuoj akceptas la senata sekretario de AIS, Reinhard Fössmeier (Rahel-Straus-Weg 19, 81673 München, Germanio;informo@ais-sanmarino.org).

Mitgliederversammlung der AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften e. V.

Gemäß Beschluss der letzten Mitgliederversammlung lädt die A I S – Internationale Akademie der Wissenschaften für den 5. September 2008 zu einer Mitgliederversammlung ein. Die Versammlung findet um 16 Uhr in der Universität Banja Luka, Bulevar vojvode Petra Bojovica 1a, Banja Luka, Bosnien und Hercegowina statt. Die Tagesordnung lautet:

1) Formalien.
2) Allgemeiner Bericht, Kassenbericht.
3) Entlastung des Vorstandes.
4) Haushaltsplan 2009.
5) Wahlen (bei Bedarf).
6) Entscheidung über Anträge aus TOP 1.
7) Verschiedenes.

Laŭ decido de sia lasta membrokunveno la asocio AIS - Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) invitas al membrokunveno je vendredo, la 5-a de septembro 2008. La kunveno okazos je la 16-a horo en la universitato de Banja Luka, bulevar vojvode Petra Bojovica 1a, Banja Luka, Bosnio kaj Hercegovino.

Reinhard Fößmeier, senata sekretario

Richtlinien für die Kompuskriptabfassung

Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 2001 auch Artikel in allen vier anderen Arbeitssprachen der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino, also in Internacia Lingvo (ILo), Englisch, Französisch und Italienisch. Bevorzugt werden zweisprachige Beiträge – in ILo und einer der genannten Nationalsprachen - von maximal 14 Druckseiten (ca. 42.000 Anschlägen) Länge. Einsprachige Artikel erscheinen in Deutsch, ILo oder Englisch bis zu einem Umfang von 10 Druckseiten (ca. 30.000 Anschlägen). In Ausnahmefällen können bei Bezahlung einer Mehrseitengebühr auch längere (einsprachige oder zweisprachige) Texte veröffentlicht werden.

Das verwendete Schrifttum ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluss des Beitrags zusammenzustellen – verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b", usf. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und Erscheinungsjahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenartikel werden - nach dem Titel - vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. – Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem, Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – **Bevorzugt werden Beiträge, die auf früher in dieser Zeitschrift erschienene Beiträge anderer Autoren Bezug nehmen.**

Graphiken (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) und auch Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu nummerieren und nur so im Text zu erwähnen. Formeln sind zu nummerieren.

Den Schluss des Beitrags bilden die Anschrift des Verfassers und ein Knapptext (500 – 1.500 Anschläge einschließlich Titelübersetzung). Dieser ist in mindestens einer der Sprachen Deutsch, Englisch und ILo, die nicht für den Haupttext verwendet wurde, abzufassen.

Die Beiträge werden in unmittelbar rezensierbarer Form erbeten. Artikel, die erst nach erheblicher formaler, sprachlicher oder inhaltlicher Überarbeitung veröffentlichungsreif wären, werden in der Regel ohne Auflistung aller Mängel zurückgewiesen.

Direktivoj por la pretigo de kompuskriptoj

Krom germanlingvaj tekstoj aperas ekde 2001 ankaŭ artikoloj en ĉiuj kvar aliaj laborlingvoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, do en Internacia Lingvo (ILo), la Angla, la Franca kaj la Itala. Estas preferataj dulingvaj kontribuaĵoj – en ILo kaj en unu el la menciitaj naciaj lingvoj – maksimume 14 prespaĝojn (ĉ. 42.000 tajpsignojn) longaj. Unulingvaj artikoloj aperadas en la Germana, en ILo aŭ en la Angla en amplekso ĝis 10 prespaĝoj (ĉ. 30.000 tajpsignoj). En esceptaj kazoj eblas publikigi ankaŭ pli longajn tekstojn (unulingvajn aŭ dulingvajn) post pago de ekscespaĝa kotizo.

La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo; en kazo de samjareco aldonu „a", „b", ktp. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De monografioj estu – poste – indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo) , la loko kaj la jaro de la apero kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - **Preferataj estas kontribuaĵoj, kiuj referencas al kontribuajoj de aliaj aŭtoroj aperintaj pli frue en ĉi tiu revuo.**

Grafikaĵojn (kiuj estas havigendaj laŭeble kiel presoriginaloj) kaj ankaŭ tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii en la teksto nur tiel. Formuloj estas numerendaj.

La finon de la kontribuaĵo konstituas la adreso de la aŭtoro kaj resumo (500 -- 1.5000 tajpsignoj inkluzive tradukon de la titolo). Ĉi tiu estas vortigenda en minimume unu el la lingvoj Germana, Angla kaj ILo, kiu ne estas uzata por la ĉefteksto.

La kontribuaĵoj estas petataj en senpere recenzebla formo. Se artikolo estus publicinda maljam post ampleksa prilaborado formala, lingva aŭ enhava, ĝi estos normale rifuzata sen surlistigo de ĉiuj mankoj.

Regulations concerning the preparation of compuscripts

In addition to texts in German appear from 2001 onwards also articles in each four other working languages of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino, namely in Internacia Lingvo (ILo), English, French and Italian. Articles in two languages – in ILo and one of the mentioned national languages – with a length of not more than 14 printed pages (about 42.000 type-strokes) will be preferred Monolingual articles appear in German, ILo or English with not more than 10 printed pages (about 30.000 type-strokes). Exceptionally also longer texts (in one or two languages) will be published, if a page charge has been paid.

Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors (abbreviated if necessary) should be indicated. Monographs should be named along with place and year of publication and publisher, if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – ***Preferred will be texts, which refer to articles of other authors earlier published in this journal.***

Graphics (fit for printing) and also tables should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. and should be referred to as such in the text. Mathematical formulae should be numbered.

The end of the text should form the author's address and a resumee (500 – 1.5000 type-strokes including translation of the title) in at least one of the languages German, ILo and English, which is not used for the main text.

The articles are requested in a form which can immediately be submitted for review. If an article would be ready for publication only after much revising work of form, language or content, it will be in normal case refused without listing of all deficiencies.